



( édition provisoire )

÷ L'Espéranto rapproche les peuples du monde entier ÷

Organe Officiel de  
l'INSTITUT CONGOLAIS D'ESPERANTO  
(A.S.B.L.)

Rédaction - Administration  
B.P. 7579 - Léopoldville 1.  
(Congo)

S O M M A I R E

E N H A V O

- La Estraro bondeziras.
- Pripensoj sur la sojlo de la nova jaro.
- Vera historio : unu egalas du.
- Une langue nationale ?
- Ĉu vi scias ? (La-kongaj elefantoj)
- L'Espéranto dans le monde.
- K.E.I.-komunikoj.
- Saniĝu per ridado.

La Estraro de Konga Esperanto-Instituto :

Louis TOKO, Nacia Prezidanto, leĝa reprezentanto ;  
Gilbert TAMBWE, Vic-Prezidanto, leĝa anstataŭanta reprezentanto ;  
Honoré KUTA, Vic-Prezidanto, leĝa anstataŭanta reprezentanto ;  
Karel BRAET, Administranto, Ĝenerala Sekretario ;  
Benoit NKOKO, Administranto pri Financaj Aferoj ;  
Samuel SAMBA, Administranto pri Membraro ;

D E Z I R A S .

AL ĈIUJ NIAJ MEMBROJ KAJ LEGANTOJ DE AFRIKA REVUO . .

F E L I Ĉ O N

B O N F A R T O N

P A C O N

DUM 1965 .

\*\*\*\*\*  
Les non-membres de l'Institut peuvent se procurer Afrika Revuo contre la modique somme de 20 F par numéro.

PRIPENSOJ SUR LA SOJLO DE LA NOVA JARO . . .

Preskaŭ unu jaro ke startis poresperanta agado en Léopoldville. Jam sep monatoj ke Konga Esperanto-Instituto ekzistas kaj evoluas.-

Pozitivaj, ni povas taksu jenajn rezultojn : tri Esperanto-kursoj okazintaj en Léopoldville (du elementaj, unu mezgrada), regula apero de Afrika Revuo ekde oktobro 1964, pli malpli regula korespondado de la membroj kun eksterlando, ekintereso de pluraj konganoj pri la problemo de internacia lingvo kaj nia movado.-

Sed ĉio tio, kvankam kuraĝiga, ne kontentigas nin. Ni ne emas viveti, male ni volas vidi tre fortan junan movadon en Kongo, kun seninterrompa reto da kursoj en ĉiuj gravaj urboj, la funkciadon de ĉiaspecaj naciaj servoj, altnivelan belaspektan presitan revuon, ktp.-

Ni ne estas la solaj, ĉie en Afriko la sama problemo staras kiel muro antaŭ la bonvolemo kaj senlaca laboro de la motoragantaj esperantistoj : mankas treege la materialaj eblecoj. Ni senhezite diras : la afrika kontinento, la junaj sendependaj landoj, la loĝantaro, estas ege malriĉaj el financa vidpunkto - kaj sen mono nenio grandskala, nenio serioza estos ebla, precipe en Afriko !

La Esperanto-movado, ĉu en Kongo, ĉu en aliaj afrikaj landoj, ĉu en Madagaskaro, nur fariĝos ian forton, se ĝi povos kalkuli je la larĝa subteno de la esperantistoj (asocioj, kluboj, unuopuloj) vivantaj en evoluantaj landoj. Kaj la afrikanoj, ankoraŭ nun kredantaj pri tutmonda solidareco de la esperantistoj, certe ne plu komprenus se tiu subteno ne realiĝos, kaj pli grave estus ke ili ne plu kredus pri tiu solidareco, kiu tamen ĉiam kaj ĉie alte estas proklamata ! La Esperanto-movado riskus esti taksata de iu "blankula afero".-

La esperantistoj vivantaj en evoluantaj landoj - do precipe blankuloj - eble ne konscias pri la neceso alporti sian helpon al la nigra kontinento. Eble tio ne tre interesas ilin, sed tiu sinteno estus grava kaj nepardonebla. Tamen, la Esperanto-movado devus komenci pripensi, ke bone forte organizita movado en Afriko donus grandan - kaj eble decidan - svingiĝon al nia afero, same kiel sur aliaj terenoj, la evoluantaj landoj devas kompreni kaj komencas kompreni, ke la mondo ne plu fariĝos sen Afriko. Tiuj kiuj ne konscias pri tiu absoluta vero, mankis jam la trajnon !

Ne povas esti eble, ke ekzemple U.E.A. estus jam kontenta se kelkaj malfortaj esperanto-organizetoj vivetus en Afriko. Tiam koncepton la konganoj certe ne komprenus : ili male esperas baldaŭ disponi pri sufiĉe vasta kaj bone funkcianta movado en Kongo, kaj ili firme esperas ricevi la necesajn rimedojn el eksterlando.-

Kiel 5-ano ROUSSEAU el Dakar skribas (1) : "U.E.A. devus krei specialan fakon nur por la disvolvigo de Esperanto en Afriko. La monrimedoj de tiu fako konsistu el : speciala donacfonduso, grava procento de la afrikaj UEA-kotizoj, subvencioj de U.E.A. Unua kompetentaĵo de la kreenda "Afrika fako" estus dispartigo de la enspezoj de la afrika donacfonduso inter la diversaj naciaj aŭ lokaj movadoj".-

Jen kelkaj pripensoj sur la sojlo de 1965. Ni esperas ke la ĉefaj organizoj de la tutmonda Esperanto-movado komprenos la problemon, aŭ almenaŭ faru la provon kompreni.-

KONGA ESPERANTO-INSTITUTO.

(1) letero kiun ni ricevis antaŭ kelkaj tagoj.

Mia onklo Paskalo estas matematikisto, granda matematikisto. Li multe laboras. Senĉese li legas aŭ verkas dikajn sciencajn librojn. Tial ofte li enreviĝas. Lia edzino vidis lin iam kuiranta sian poŝhorloĝon kaj tenanta mane la ovon, kiun li volis kuiri . . .

Alifoje, li haltigis sian aŭton meze de grava strato por skribi la solvon de unu ekvacio. Ĉirkaŭ li, aliaj ŝoforoj avertis, kriis, koleriĝis. Nenion aŭdis li. Terure ! Ĉiuj kredis lin freneza. Oni vokigis ambulancojn kaj policanojn. En la malliberejo, li daŭrigis skribi. Lia frato ministro feliĉe eksplikis ĉion al la policokomisaro kaj rekondukis mian onklon Paskalo hejmen. Tie, li daŭrigis skribi. Neniam li sciis, ke oni arestis lin . . .

Lastan semajnon, mi donis al li du librojn pri Esperanto. Li diras, ke Esperanto estas tre matematika lingvo. Li multe ŝatas ĝin. Ĉar mi konas lian kutiman forgesemon, tial mi demandis, kiam mi povos repreni tiujn librojn. Post ses tagoj, li diris.

Hieraŭ mi iris al lia domo kaj mi postulis miajn du librojn.

- Jen, li diris.
- Sed mi nur vidas unu libron. Tamen mi donis du librojn.
- Vi pravas, li respondis, sed por la matematikistoj unu egalas du.
- Mi ne kredas ! Donu al mi du librojn aŭ pruvu, kion vi diris !
- Se mi pruvos tion, ĉu vi estos kontenta havi nur unu libron ?
- Jes ja ! (Mi kompreneble kredis, ke li ŝercas. Ne estas vera, ke unu egalas du, ĉu ne ? Mi jam ekridis en mia kapo.)

Li iris trankvile al sia tablo, prenis grandan paperon kaj ekdiris : (jen la dialogo)

Onklo : Ĉu vi lernis algebron lerneje ?

Nevo : Jes, kial ?

Onklo : Supozu, ke mi skribas la jenan egalaĵon :  $a = b + c$

Ĉu mi povos multipliki la du membrojn per unu sama nombro ?

Nevo : Certe.

Onklo : Mi multiplikas per la nombro  $(b + c)$ . Mi obtenas :  $a(b+c) = (b+c)(b+c)$

Tio povas skribiĝi :  $a(b+c) = (b+c)^2$

Aŭ :  $ab + ac = b^2 + 2bc + c^2$

Ĉu vi komprenas ?

Nevo : Mi bone komprenas. Pluen ! (Mi ektimis, ĉar lia vizaĝo estis tro gaja.

Ĉu li sukcesus ? Ne, ne ! Ne eblas !)

Onklo : Kiel  $2bc = bc + bc$

mi skribos la lastan egalaĵon tiel :  $ab + ac = b^2 + bc + bc + c^2$

Ŝanĝante la signojn, mi pasigas ĉiujn faktorojn en la unua membro :

$ab + ac - b^2 - bc - bc - c^2 = 0$

Vi scias ankaŭ, ke mi povas ŝanĝi la ordon de la faktoroj sen ŝanĝi

la egalaĵon :  $ab - b^2 - bc + ac - bc - c^2 = 0$

Faru kontrolon. Ĉu estas ĝuste ?

Nevo : Mi vidas ke tute jes.

Onklo : Mi prenas la literon  $b$  el la triunua nombroj kaj la literon  $c$  el

la trilastaj. Se vi bone konas la algebron, vi scias, ke mi povos

skribi :  $b(a-b-c) + c(a-b-c) = 0$

Nevo : Efektive, mi lernis tion. Sed kial vi metis ĉion en la saman membron ?

Onklo : Ĉar vi volas, matematike skribas mi :  $b(a-b-c) = -c(a-b-c)$

Ĉu oni povas dividi la du membrojn per unu sama nombro ?

Nevo : Ĉiam !

Onklo : Mi dividas per  $(a-b-c)$ . Restas :  $b = -c$

Nu vi scias, ke  $a = b + c$

Sekve,  $1/ b = a - c$ , kaj  $2/ - c = b - a$   
 Mi anstataŭigas  $b$  kaj  $-c$  en la lastan egalaĵon.  
 Venas :  $a - c = b - a$ , aŭ ŝanĝante faktorojn :  $a + a = b + c$   
 $2a = b + c$

Cu vi ĉiam konsentas pri tio ?

Nevo : Estas facile.

Onklo : Mi anstataŭigas  $b + c$ , ĉar mi decidis komencinte, ke  $a = b + c$

Mi skribas rezulte :  $2a = a$ , kaj do  $2 = 1$

Jen unu libron ! Bonan nokton, mia nevo ! Ĝis revido !

✦ ✦ ✦

Mi petas vin ! Mi petegas ! Se vi konas la algebron, serĉu la eraron.  
 Skribu al Akrika Revuo por doni la solvon. Se ne estas eraro, mia malbonkora  
 onklo Paskalo ne redonos al mi la duan libron. Kaj mi ne povos plu studi Es-  
 peranton ! Ve ! Helpu min samideane, karaj amikoj ! Vi povos tielmaniera gaj-  
 ni tutjaran senpagan alsendon de Afrika Revuo !

André MALĜOJ,

\*\*\*\*\*

### UNE LANGUE NATIONALE ? . . .

Proposer une langue nationale comme instrument de compréhension universelle, voilà un argument qui mérite quelque attention, d'autant plus que nombreux sont encore ceux qui estiment que le français, l'anglais ou l'espagnol peuvent résoudre facilement le problème. Bien que ces trois langues soient parlées par un nombre respectable d'individus, deux faits sont néanmoins à remarquer. D'abord, le français parlé en France n'est pas celui dans lequel s'expriment les Belges wallons, les Suisses ou les Canadiens; on peut presque faire état de dialectes français; l'anglais et l'américain différent et l'espagnol et la langue des républiques sud-américaines présentent de nombreuses dissemblances. Nous nous trouvons donc en face de particularités dialectales. Ensuite, la faveur dont jouit une langue est fonction de l'importance du rôle politique que joue dans le monde le pays qui lui correspond; jadis, le latin fut la langue de tout le monde civilisé, car Rome faisait partout sentir sa puissance. A l'apogée de la monarchie française, le français connut une faveur peu commune, au point d'acquérir le surnom enviable de "langue diplomatique", mais à l'heure actuelle les choses sont bien changées, puisque contre 80 % de délégués de la S.D.N. qui utilisaient le français, 15 % seulement de ceux de l'O.N.U. l'emploient maintenant.

Une langue internationale doit être à l'abri de toutes les fluctuations politiques; librement acceptée et parlée par tous les peuples, elle ne doit lier son sort à aucune nation ou à aucun bloc ethnique. D'autres raisons encore s'opposent à l'adaptation d'un idiome national. Au cours des études secondaires, un élève qui a étudié l'anglais ou l'espagnol pendant plusieurs années est incapable de parler la langue; tout au plus, arrive-t-il à grand peine et moyennant hésitations, erreurs et gestes, à se faire comprendre. Une langue internationale doit être suffisamment facile pour qu'après quelques semaines d'études, une personne d'instruction moyenne puisse s'en servir utilement. N'oublions pas enfin le sentiment d'infériorité qui se manifesterait inévitablement à l'égard des nations dont la langue n'aurait pas été retenue. Par contre, la nation privilégiée verrait croître simultanément son prestige à l'étranger et la haine entretenue par des nationalismes plus ou moins chauvins chaque peuple cherchant à étendre sa langue et sa culture au-delà de ses frontières.

(extrait de l'Espéranto, cette inconnue, A. Ribot, 1953)

La kongaj elefantoj . . .

En nia lando ekzistas du specoj de elefantoj : unu kiu vivas en la grandaj ekvatoraj arbaroj kaj alia kiu vivas en la nordorientaj, orientaj kaj sudaj savanoj.

La raso de la arbara elefanto estas science nomita "loxodonta cyclotis". Ĝi estas forte ĉarpentita sufiĉe dika besto kies oreloj estas plataj, rondformaj. Ĝi havas relative glatan kaj malhelan haŭton. Ĝiaj dentegoj ĝenerale longaj, preskaŭ paralelaj, estas direktitaj malsupren; ĉe kelkaj virseksuloj ili povas eĉ tuŝi la teron kiam ili atingis ĉirkaŭ tridekjaran aĝon. La malnola kaj kompakta eburo estas vendita sub la nomo de konga eburo.

La savana elefanto, kiun la naturistoj nomas "loxodonta africana", tre mal similas al sia arbara frato. Malpli masiva, pli osta, ĝi havas selforman dorson; ĝiaj oreloj triangulaj refaldiĝas malantaŭen; ĝi havas helgrizan raspecan haŭton. Ĝiaj dentegoj kurbiĝas supren kaj eksteren. La rozetkolora, facile skulptebla eburo estas konata sub la nomo de nola eburo.

Elefantoj vivas en familiaj grupoj de du ĝis dudek individuoj. En la savanoj tiaj grupoj foje renkontiĝas kaj tiam formas aron de pli ol unu milo; sed tiaj anasiĝoj estas nur provizoraj.

Maljunaj virseksuloj ofte forlasas sian familion kaj estas ili kiuj doniĝas plantejojn. Elefantaro konstante migras serĉante nutraĵojn. Ili konsumegas verdaĵojn : herbo, folioj, fruktoj, radikoj kaj eĉ ŝelo de arboj. Krom du aŭ trihora profunda dormado kaj sanlonga dormetado, ili kvazaŭ senhalte manĝadas.

En la savano la elefantoj ekmanĝas matene je la tria horo. Ĉirkaŭ la 10-a aŭ 11-a horo, ili kaŝas sin sub granda arbo por ŝirmi sin kontraŭ la tro forta suno. Aliaj instaliĝas por la siesto en marĉo kie ili kuŝas sin en la ŝlino. Post la siesto ili denove manĝas migrante ĝis noktmezo, kiam ili kuŝas kaj profunde dormas. Dum seka periodo kiam herbo kaj arbustoj kelkloke ekbrulas, ili rifuĝas en altan nebrulitan herbon por resti tie ĝis la nokto alproksiniĝas.

En la densa arbaro, kie nutraĵo kaj akvo same kiel ombro abundas, la vivkutinoj estas ankoraŭ pli regulaj kaj ne varias dum la tuta jaro.

La famaj elefantaj tombejoj, tiel ofte priskribitaj en vojaĝrakontoj, ŝajnas ne ekzisti. Se oni trovis amason da elefantaj skeletoj en la sama loko, la morto de la bestoj estis verŝajna kaŭzo de gravaj brulvundoj sekve de ĉirkaŭanta fajrego.

La nombro da kongaj elefantoj estas proksimume centmil.

Por doni al vi ideon pri la pezo de plenkreskinta elefanto, jen kelkaj ciferoj pri elefanto pafita ĉe la loko Api kaj senprokraste dispecigita kaj pezita : rostro = 117 kg ; oreloj = 84 kg ; cerbo = 5 kg ; hepato = 74 kg ; koro = 21 kg ; grasaĵoj = 106 kg ; visceroj = 300 kg ; muskoloj = 2.776 kg ; haŭto = 542 kg ; ostaro = 1.600 kg.-

L'ESPERANTO DANS LE MONDE . . .L'ASSOCIATION UNIVERSELLE D'ESPERANTO COLLABORE DEPUIS 10 ANS AVEC  
L'U.N.E.S.C.O.

Voilà dix années que deux importantes Résolutions furent adoptées par la Conférence Générale de l'Unesco à Montevideo (Uruguay), les 8 et 10 décembre 1954. D'une part, pour la première fois, la valeur culturelle de la Langue Internationale Espéranto fut reconnue officiellement par une organisation mondiale pour l'éducation, la science et la culture, alors que, d'autre part, la Conférence établissait des relations consultatives entre l'Unesco et l'Association Universelle d'Espéranto.

Le 2 août 1950, l'Association Universelle d'Espéranto transmettait solennellement au Secrétariat des Nations Unies à New-York, une importante Pétition, signée par 895.432 personnes individuelles, et par 492 Organisations comprenant au total 15.454.780 membres. A son tour le Secrétariat des Nations Unies transmit la Pétition à l'Unesco, en tant qu'Organisation spécialisée de l'ONU. C'est ainsi que, après une information détaillée, la Conférence Générale de l'Unesco adopta, le 10 décembre 1954, à une grande majorité, la Résolution présentée par la délégation mexicaine. Cette Résolution historique acceptait l'Espéranto comme un fait social, reconnaissant que les résultats atteints par l'Espéranto dans le domaine des échanges internationaux et pour le rapprochement des peuples répondent aux buts et idéaux de l'Unesco, soit : protection de la paix, diffusion de Culture et d'Education, de connaissances scientifiques, etc.

Cette contribution aux buts de l'Unesco s'est développée de façon de plus en plus efficace depuis l'établissement des relations consultatives entre l'Association Universelle d'Espéranto et l'Unesco. Tout d'abord l'U.E.A. (Association Universelle d'Espéranto) a pu diffuser les informations relatives aux buts et travaux de l'Unesco par des conférences, lors des congrès ou des Cercles d'Etudes spécialisés, de même que par des tournées de conférences. Une aide toute particulière a été apportée par l'U.E.A. au Projet Majeur de l'Unesco relatif à l'Appréciation Réciproque des Valeurs Culturelles de l'Orient et de l'Occident. Notamment, elle prit l'initiative de publier des oeuvres représentatives, traduites des littératures nationales en Espéranto. D'autre part, l'Unesco, à plusieurs reprises, a fait paraître - ou contribué à leur parution - des affiches ou autres éditions relatives aux buts de l'Unesco, dans la Langue Internationale.-

DES ELEMENTS JAPONAIS DANS LE DICTIONNAIRE D'ESPERANTO.

Osaka.- A Osaka (Japon) vient de paraître dans une édition de luxe une "Petite Encyclopédie Japonnaise", dans laquelle l'auteur, T. Nakamura, membre de l'Académie d'Espéranto, a recueilli, illustré et défini environ 400 termes provenant de la langue japonnaise et ayant été introduits dans la Langue Internationale Espéranto. La plupart de ces termes (parmi lesquels se trouvent, non seulement des mots très connus comme geisha, nikado, saké, mais aussi de nombreux autres noms se rapportant à la botanique, la zoologie, etc.) ont déjà été utilisés pour traduire en Espéranto de la littérature japonnaise, de même que dans des revues espérantistes éditées au Japon.

Ce beau volume, édité en l'honneur du 50ème Congrès Universel d'Espéranto, qui se tiendra à Tokio en août 1965, souligne le fait que la Langue Internationale est influencée par les écrivains orientaux comme par les occidentaux.-

\*\*\*\*\*

K.E.I.-KOMUNIKOJ . . .

- Léopoldville. Post ekzameno, naŭ gelernantoj obtenis la ateston pri elementa Esperanto-studado.
  - Ni ricevis dankene jenajn revuojn, gazetojn aŭ bultenojn : The North Esperanto Review (Esperanto Ligo de Nord-Ameriko), La Skolta Mondo (oficiala organo de Skolta Esperantista Ligo), Franca Esperantisto (oficiala organo de Unuiĝo Franca per Esperanto), Nia Ligilo (monata bulteno de la Asocio de Laboristaj Esperantistoj en Suda Holando), La Gazeto (Centre National Espéranto-Office, Francujo), Heroldo de Esperanto (internacia organo, Belgujo), Voko el Stirio (oficiala organo de la Esperanto-movado en Stirio, Aŭstrujo), La Vorto (revuo por kristanismo, Aŭstrujo). Ni seninterrompe alvokas ĉiujn Esperanto-asociojn, institutojn kaj klubojn, sendi regule al ni siajn revuojn, bultenojn, k.s. Ĉio kion ni ricevas valoras por nia nacia biblioteko "Dro Zamenhof". Rekompence, ni sendos akurate Afrika Revuo-n.
  - Ni daŭre petas korespondadresojn. Pluraj el niaj lernantoj kaj membroj atendas ankoraŭ korespondamikojn !
  - **ALVOKO !** Ni organizos grandskalan ekspozicion de infandesegnaĵoj el la tuta mondo. Ĝi okazos en la kadro de la manifestacioj kiuj estos organizitaj en Léopoldville okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro. Por certigi la sukceson de tiu altnivela okazintaĵo, kiu certe helpos plialtigi la reputacion de nia asocio, ni do alvokas ĉiujn ĝeinstruistojn, ĉiujn pedagogiajn institutojn kaj klubojn el la tuta mondo, sendi al ni, s e n p r o k r a s t e, infandesegnaĵojn.
- Temo : okazintaĵoj pri la ĉiutaga kaj lerneja vivo, naciaj ludiloj, pupoj, maskoj, faŭno kaj flaŭro.
- Materialo : desegna papero (proksimume 27 cm x 37 cm) ; akvarelo, paŝtelo, guaŝo, karbokraĵono, tuĉo.
- Aĝo : de 6 ĝis 15 jaraj infanoj. Dorsflanke menciui sur ĉiu desegnaĵo : nomo, adreso, aĝo de la infano, temo kaj eblaj klarigoj.
- Limitdato : ĉiuj desegnaĵoj devas esti en Léopoldville antaŭ la 1-an de septembro 1965. La ekspozicio okazos fine de septembro. Sed ekagutuj ! Ĉar per boata vojo daŭras monatoj antaŭ ol ĉiu alvenos ĉe ni.
- Rekompenco : ĉiu sendinto ricevos rekompence, ĉu poŝtmarkoj, ĉu la revuo dum unu jaro. Ili mem precizu !
- Vi certe komprenas ke tenas pri unika okazo montri al la ŝtataj pedagogiaj instancoj la kulturan kaj pedagogian valoron de nia movado. Ni fidas firme al la kunlaborado de niaj eksterlandaj ĝeamikoj ! Ĉiuj Esperanto-revuoj, gazetoj, k.s. bonvolu aperigi tiun ĉi komunikon. Koran dankon !
- Generala kunveno de K.E.I. okazis la 3-an kaj estrara kunveno la 10-an de januaro en Linete-Léopoldville. Kron elekto de definitiva estraro, vasta programo estis ellaborita rilate al la agado dum 1965. Ĉiuj eblecoj estos ekzaminataj por povi sendi delegiton al la 50-a U.K. en Tokio.



S A N I G U   P E R   R I D A D O !

Loĝanto de Stratford-sur-Avon demandas al frendulo  
kial li vizitas la urbon.

- Ĉar Shakespeare vivis ĉi tie.

- Shakespeare ? Se ne estus ĉiuj tiuj teatraĵoj  
kiujn li skribis, oni eĉ ne scius kiu li estis . .

+

Filmo rakontas la kortuŝan historion de humbla  
familio kaj siaj problemoj dum la franca  
revolucio.

Sed parolema rigardantino rifuzas esti impresata.

- Mi nenion kredas, ŝi alte proklamas, se ili  
vere estus tiel malriĉaj, kiel ili posedus  
tiom da mebloj de la epoko ? . .

+

\*\*\*\*\*  
DEVENEZ MEMBRE DE . . . L'INSTITUT CONGOLAIS D'ESPERANTO . . .

Cotisations annuelles.

Membres effectifs. (personnes qui connaissent la Langue Internationale ou  
qui l'apprennent)

- simples : 500 F.                      - de soutien : 1000 F.

Membres adhérents. (personnes, institutions ou sociétés sympathisantes approu-  
vant l'idée de la Langue Internationale)

minimum : 5000 F.

Comment nous faire parvenir votre cotisation ? En virant le montant à notre  
Compte Chèque Postal n° B 2273 à Léopoldville, ou en nous envoyant votre  
chèque bancaire ou mandat postal . . .